

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de I.K.U.E. ★

===== ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO =====

Prezidanto : S-ro R. Cl. COLAS,- 6, rue de Mézières - 75006 PARIS
Sekretario : S-ro Jean BARRIER,- 89, rue Salengro,- 93700 DRANCY
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- 27700 LES ANDELYS

C.C.P.- Association Catholi. Franç. pour l'Epéranto - ROUEN- 23 24 93 K.-

=== le N° : 1 Fr; === Abono 4 Fr-; kotizo 1 Fr; Sume = 5 Fr-.

Redaktorino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- 27700 LES ANDELYS

Sendu la materialon por la bulteno antaŭ la 20-a de marto,
la 20-a de junio, la 20-a de septembro, la 20-a de decembro.

+++++

~~666~~x --- N° 96 --- BULLETIN TRIMESTRIEL --- TRIMONATA BULTENO -----

Sankta Pio X-a, preĝu por ni .

---- Aprilo 1973 ----

=====

XX

E N H A V O

paĝoj : 2-3	: Bileto de la prezidanto	8-10	: la legantoj skribas
" : 3	: Paska ĝojo	10	: Informoj
" : 4-5	: lingva angulo	10	: nia membraro
" : 5-6-7	: Protokolo de la konsilia	11	: distra paĝo
" :	: kunveno	11	: vivmaniero
" : 7-8	: la rozario (daŭrigo)	12	: kotiztabelo
" : 9	: voĉdonilo kaj rajtigilo por la jarkunveno .		

=====

KONGRESO DE LA FRANCA KATOLIKA ESPERANRO ASOCIO

PARIS 12/13-an de Majo 1973 (vidu N°95- Januaro 1973)

KONGRESEJO / Maison de Retraite du Sacré-Coeur, 3, cité du Sacré-Coeur
40, rue du Chevalier de la Barre - 75018 PARIS

(Metro-stacio : Abbesses)

KORESPONADRESO KAJ ALIĜOJ : S-ro R. Despiney,-43 quai de Champagne
94170 LE PERREUX SUR MARNE

B I L E T O D E L A P R E Z I D A N T O .

Dès les premières années où la Langue de Zamemhof a commencé à se répandre, une Presse en Espéranto est née, venant de tous les horizons. Ce travers à moyen d'expression commun, une nouvelle conception universelle est née.

Tous les mouvements d'idées, les philosophies, les opinions sur la vie des hommes ont utilisé ce moyen de communication.

ESPERO KATOLIKA a pris une grande place dans ce concert, en faisant entendre aux espérantistes une voix chrétienne.

L'Abbé EMILE PELTIER, conquis par les ressources potentielles de la Langue Internationale fonda en 1903 - il y a soixante dix ans. - cette revue vit toujours.

Cette publication interrompue seulement par les deux guerres mondiales, n'a cessé de paraître. Elle a connu des vicissitudes, passées selon les époques d'un pays à l'autre, mais a toujours dominé ses problèmes.

Parmi ceux-ci, il a fallu résoudre les difficultés financières : il ne manque pas de besoins, et l'aide que vous pourriez apporter serait bienvenue. Il est notamment des pays qui ne permettent pas les sorties d'argent, et qui ne peuvent recevoir notre revue que grâce à l'aide fraternelle qui leur est offerte.

L'Abbé Peltier présentait le mouvement OEcuménique, et l'Espéranto lui a permis de correspondre avec des membres de diverses Eglises Chrétiennes.

Nous avons la joie de voir désormais des Congrès communs, des numéros spéciaux édités par "Dia Regno et Espero Katolika". Les nouveaux responsables de notre revue ont fait un remarquable effort de présentation. Bien imprimée, satisfaisante au point de vue de la langue, elle reflète la vie du Mouvement dans les divers pays. Espero Katolika fait appel, et accueille les articles intéressants et bien rédigés, venant de tous les pays, car sa raison de vivre est d'ouvrir ses pages aux associations nationales ou à toutes personnes qui, dans son Esprit, peut donner une information ou un texte d'intérêt général.

I- TRADUKA PARTO.

Al la januara propono respondis 5 anoj de nia asocio, nome : S-roj Broise (B); Dauchez (D); J.M. Guillon (G); S-ino Michau (M); kaj S-ro Ribot (R).

Jen iliaj tradukoj :

- 1) Etre bien dans sa peau : komforte esti en sia persono (B); sin senti komforta (D); bonege plenumi sian propran rolon (G); komforte, kontentige vivadi (R).
- 2) Etre mal en point : esti en danĝero (B); esti malkomforta (D); suferi pro malsaneto (G); farti tute ne bone, senespere malsani (R)
- 3) Vous n'y êtes pas du tout : vi tute ne komprenas la aferon (B); vi tute eraras (D); vi tute ne komprenas la kialon (G); tute ne temas pri tio, vi miskomprenas la aferon (M); vi plene miskomprenis (min, miajn klarigojn) (R).
- 4) Gagner sur tous les tableaux : ie ajn gajni, ĉiam kaj ĉie gajni (B); profiti, kio ajn estu la rezulto (D); venki laŭ ĉiuj vidpunktoj (G); esti ĉiurilate avantaĝata (M); venki sur ĉiuj kampoj (R).
- 5) Prendre un pot : trinki bierglasegon, trinki malvarmetan trinkaĵon (B); amike kuntrinki (D); trinki glason da biero (G); sin sensoifigi, renkontokaze trinki (M); engluti vinon, glason da vino (R).
- 6) Avoir le pied marin : ekvilibre stari sur ŝanceliĝanta boato (B); ne naŭzi surŝipe (D); veturadi ne suferante pro ia marmalsaneto (G); ne timi marmalsanon, esti memfida (M); konduiti kvazaŭmariste, taŭge konduiti surŝipe (R).
- 7) Etre d'une humeur de chien : esti en malafablega humoro, malafablege humori (B); grumbli kvazaŭ gardhundo (D); malbonege humori (G); esti ege malbonhumora (M); esti terure malbonhumora, troviĝi en fiakra humoro (R).
- 8) Faire son beurre sur le dos de quelqu'un : riĉigi koste de aliulmon (B); pliriĉigi per ies malprofito, fari butron el ies lakto (D) perlabori je kostopago de iu (G); gajni je ies malprofito (M); profiti malprofite al iu (R).
- 9) Se mettre en boule : erinace koleriĝi, ekkoleri (B); fariĝi malafabla kiel erinaco (D); furioziĝi (G); nervozstreĉigi (M); erinace konduiti (R).

.../...

10) Un flic : policanaço (B); policano, fipolicano (D); policoficisto ĝendarmo (G); neŝatata policisto (M).

Pri tiu lasta esprimo, S-ro Ribot rimarkas : "Tute ne tradukebla nuanco. Fi ne taugas, ĉar en "flic" ne ekzistas, almenaŭ ĉe multaj homoj, malama nuanco. De tiu stranga vorto esprimas nenion alian el "policano".

Hodiaŭ la honormedalon al S-ro Dauchez !

Bonvolu serĉi taŭgajn tradukojn por la jenaj esprimoj proponitaj de S-ro Jahier : 1) la boucler (se taire); 2) cela tient à un cheveu; 3) c'est une petite nature; 4) mettre quelqu'un dans sa poche; 5) le fond de l'air est frais; 6) pas question !

de S-ro Dauchez : 7) Il habitait Paris en 1967, mais il a habité Versailles également au cours de cette même année."

de S-ino Michau : 8) un boute-en-train.

II. GRAMATIKA PARTO

Le verbe français penser a deux traductions en Espéranto : pensi et opinii. Il ne faut pas les confondre. Opinii c'est penser dans le sens avoir une opinion : "oni opinias, ke ...";pensi c'est avoir une pensée : "oni pensas pri..."

Certains autres verbes font également difficulté car ils ont une forme passive en français et active en espéranto. Il s'agit de Stari (être debout); kuŝi (être couché, situi (être situé). "Mi staras" signifie à lui seul "Je suis debout". Il ne faut donc pas dire "virino sidata sur seĝo", mais bien "virino sidanta sur seĝo". De même on dira "urbo situanta apud rivero", "kato kuŝanta sur tablo"

A. Bessière.

=====

PROTOKOLO DE LA KONSILIA KUNVENO

de la 25-a de februaro 1973

Ĝi okazis en Paris, 34, rue de Chabrol, en la ĉeesto de S-ino Vincent, S-roj Colas, R. Despiney kaj F-to Marmou.

Petis senkulpigon : S-to Baudry, S-roj Barrier kaj Bessière.

Je la 15-a, la prezidanto malfermas la kunvenon per la preĝo "Patro nia".

.../...

.../...

I. PROTOKOLO DE LA NOVEMBRA KUNVENO

Nenia rimarko estas farita; la protokolo estas unuanime aprobita.

II. FINANCAJ AFEROJ

1) Fonduso-Domo UFE : inter la novembra kunveno kaj la nuna alvenis 300 Fr- da donacoj. Oni daŭrigas la kolektadon, des pli, ke nova sidejo estas trovita.

2) Anoncetoj en nia bulteno : ili estos akceptitaj sen tarifo kontraŭ libervola donaco.

3) Mesintencoj : oni petos de la sacerdotoj, kiuj diservos en la nacia katolika kongreso. Oni ankaŭ sugestas, ke kongresanoj povos peti mesintencojn dum nia kongreso.

4) Repago de parto de la vojaĝelspezoj de la konsilianoj : oni decidis repagi la duonon; tio validas ekde 1973.

III. ADMINISTRAJ AFEROJ

Pri la malfacilaĵoj por la presado de la ludpaĝo de nia bulteno, F-to Marmou klarigas, ke eble povos esti solvo dank' al akiro en La Houssaye de moderna aparato por fari la desegnojn.

IV. KONGRESAJ AFEROJ

-Jam 11 personoj aliĝis. S-ro Despiney informas, ke li aperigis anoncon pri nia kongreso en la bulteno "Pariza federacio".

-La 30-an de aprilo, li informos la respondeculinon de la kongresejo pri la nombro da necesaj ĉambroj.

-Programo de la ĝenerala asembleo : a) morala raporto de S-ro Colas; b) financa raporto de S-ino Vincent; c) voĉdonoj :

1- pri la morala raporto, -2 - pri la financa raporto, -3- pri la renovigo de 1/3 de la konsilio : por 5 liberaj lokoj estos 5

gekandidatoj : F-ino Vanneau, S-roj Barrier, Ligot, Ribot kaj F-to Marmou.- ĉ) elekto de la estraro; d) elekto de la loko de la venonta kongreso (1974)

- Sabata vespero : la partoprenontoj estas invitataj prepari ion kiu gajigos la ĉeestantaron.

- Informado : en la ĵurnalo "La Croix" kaj en la paroĝna bulteno "Montmartre" : S-ro Despiney tion prizorgos.

V. DIVERSAĴOJ

- legado de letero de S-ro Bessière responde al tiu de D-ro Albault

.../...

.../...

F-to Marmou anoncas, ke la KELI-İKUE-kongreso okazos en Pécs (Hungarujo) de la 21-a ĝis la 28-a de julio 1973.

- la daton de la venonta konsilia kunveno oni elektos dum la kongreso. Tiu kunveno okazos verŝajne en la nova sidejo de UFE; la nuna estas la lasta, kiu okazas strato de Chabrol, kie deĵoris tiom longe F-ino Paulier. La prezidanto fermas la kunvenon per preĝo memore al nia karmemora amikino.

Protokolis R. Despiney.

xx

L A R O Z A R I O

Kiam venis la tempo de la Malbonaj Tempoj, Maria malsupreniris sur la teron por nin averti kaj nin antaŭzorgi. La unuan fojon, en 1830, komemcante en Paris la ciklon de siaj aperoj, ŝi precize diris al ni : "La Tempoj estas tre malbonaj." Ni atentu la vortojn de Maria ! Kiam ŝi ete parolas, laŭ la tradicio de ŝia humileco, tamen ni ne forgesu, ke ja la plej granda parolas kaj ke ŝiaj etaj vortoj havas sencon kaj gravecon laŭ la dimensio de ŝia majesto.

Jes, Maria venis, ĉar venis la tempo de la Malbonaj Tempoj kaj ĉar tuj komenciĝos la decidiga periodo de la grava Batalo. Kaj ŝi venis memorigi al ni, ke per la Rozario, la venko estos akiritita.

- La aperoj ? Nu do ! Ĉio tio ne estas serioza !

Kaj ĉar li, la Malamiko, scias, ke estas tre serioze, li ne cedos ĝis kiam li sukcesos haltigi ilin. Kristano plenkreska travivas nun ian honton kredi je la aperoj.

Estas vere, ke Maria neniam sin turnas al plenkreskuloj, sed ĉiam al "infanoj". "Estu kiel infanoj", diras Jesuo.- "Nun vi estas plenkreskaj", diras la alia.

*

Do, Maria, laŭ dekreto de Dio, enskribita ekde la Genezo, venas nun por forpeli tiun, kiu ekkaptis la mondon, kaj kiu hodiaŭ terure regas, abomene kaj kvazaŭ jam tute. Sed Maria nenion povas sen la homoj. La homoj estas samtempe la aĵoj kaj la aliaj de la lukto. Maria bezonas nian preĝon. Ŝi invitas nin, ŝi petas nin, ŝi petegas nin preĝi. Kaj ne iu ajn preĝo, sed la preĝo de la Batalo : la Rozario

.../...

Ĝenerala kunveno de FKEA

Dimanĉon, la 13-an de majo 1973

°0°0°0°0°

Bonvolu resendi la ĉi suban voĉdonilon al nia provizora sekretario S-ro Roger Despiney, 43, quai de Champagne, 94170 LE PERREUX SUR MARNE antaŭ la 9-a de Majo 1973, en fermita koverto, afrankita je 0,50 Fr, kun indiko "Voĉdonado FKEA.". Ne forgesu indiki dorsflanke de la koverto vian nomon kaj adreson.

N.B.-- Tiun koverton oni malfermos nur dum la ĝenerala kunveno. Se vi volas persone skribi al S-ro Despiney, vi povos enŝovi ĝin kun via korespondaĵo en alian koverton, tiun ĉi sen indiko, adresitan al li.

Se vi ne partoprenos la kongreson, bonvolu krome resendi la ĉi-suban rajtigilon al S-ro R. Despiney antaŭ la 9-a de majo 1973.

.../...

NEKREDANTOJ EN ESPERANTUJO. Kiom da ili ?

Respondon mi ĉerpis el franca bulteno eldonita de laborista rondo esperantista. Laŭ la artikolo, gvidanto deziregas, ke ĉiuj membroj de lia rondo estu ateistoj. Samlingvano responde atentigas lin pri tio, ke tia postulo kondukus al la eksigo de 95 % el la nunaj anoj. Laŭ tiu esperantisto, iu starigis 12 argumentojn kontraŭ la kredo de Dio. Sed alia respondis per 14 pruvoj favoraj al la diisma tezo.

Neniu povos postuli, ke ĉiuj samlingvanoj malkonfesu ĉion religiecan.

Tamen estas kelkaj nekredantoj en Esperantujo; ni devas preĝi la Sinjoron, por ke al ĉiuj homoj Li donu sian lumon kaj savon.

J.M. Guillon.

=====

I N F O R M O J

.....

KURSOJ EN KATOLIKAJ LERNEJOJ

Cheviré, Cuon kaj Vieil-Baugé (M & L); la ĝeinstruistoj, helpitaj de F-ino Claire el Baugé, samtempe lernas kaj instruas per Junulkurso al ĝelernantoj de CE 2, CM 1 kaj CM 2. La ĝepatroj konsentis pri tiuj kursoj.

FONDUSO-DOMO (3-a listo)

15) S-to Rederstorff : 25 Fr; 16) S-ro Thiollière (4): 50 Fr; 17) F-to Marmou : 50 Fr.- Fina sumo : 943 Fr.- Tutkoran dankon al la donacintoj kaj donacontoj ! Nova sidejo estas nun aĉetita, sed necesas ĝin pretigi por uzo per riparoj.

=====

NIA MEMBRARO

- 1) Novaj membroj 1973 : 3) S-ro Giloteaux (Nord)
- 2) Membroj subtenantoj : S-ro Le Marquand (C-du-N)

=====

ANONCETO

Jean AMOUROUX, 1, rue de Sorède, 66000 PERPIGNAN, bezonas la ĝenajn numerojn de ESPERO KATOLIKA /: 40,70/77, 79,80,93/96,98/104, de 107 ĝis la fino de la 11-a jaro (1914). Repagas laŭdezire.

=====.../...==

